



Esploroj pri pionira interlingvisto

Kiaj estas la angloj? • Kiuas Malcolm Jones?

- 5 • Verda lingvo, ruĝaj ĉemizoj**
Tim Owen pri lingva festivalo
- 6 • Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?**
Malcolm Jones pri si
- 12 • Pri vizoj kaj vostoj**
Mamed Madok'ba kaptas la okazon
- 15 • Hazardo neelkalkulebla**
La mirindaj spertoj de Geoffrey Sutton
- 18 • Mistero de la mankantaj virinoj**
Kiam NOEF kunvenis en Ĉestro
- 20 • Drondo-ondo**
Pri du diskutrondoj raportas Tim Owen
- 22 • Recenzoj**
de Paul Gubbins kaj Tim Owen
- 26 • Bona ... sed ĉu la lasta?**
Peter Bolwell priskribas semajn-finon en Aylesford
- 27 • Forestis universitatoj dum la prelego de Angela Tellier**
- 28 • Kiaj estas la angloj?**
Jack Warren esploras la demandon
- 36 • Ora epoko, ora prelego**
Tim Owen ĉeestis prelegon pri la japana E-movado
- 37 • Brian O'Sullivan**
Nekrologo
- 38 • Babile**
Paul Gubbins

Kovrila foto

*En oktobra prelego d-ro Angela Tellier ebligis gustumi sian baldaŭ eldonotan libron pri la pionira esperanta interlingvisto William Collinson.
Legu pli en paĝo 27.*

redaktis: **Paul Gubbins** *limdato por la printempa numero:*
paul@gubbins.org.uk 31 aŭgusto 2016
3 Arden Court, Mossley, Congleton, Cheshire, CW12 3JH

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**
eab@esperanto.org.uk

telefone: +44 (0)1782 372141 *aŭ en Britio:* 0845 230 1887 *fakse:* 01782 372393

retejo: **esperanto.org.uk/lbe** ISSN 0007-067X

fasonis: Ava Rowell *enpaĝigis:* Simon Davies *presis:* Panda Press

La Brita Esperantisto kaj EAB Update estas eldonataj entute ses fojojn jare. Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB. Nemembroj povas aĉeti LBE de la EAB-libroservo en Barlastono.

Ni normale ne akceptas paperajn kontribuojn.

Kontribuoj estu sendataj elektronike kiel ODT, DOC, RTF, aŭ plata teksto.

Fotoj estu kunsendaĵoj, apartaj de la akompana teksto.

Fotoj aperintaj en LBE ne estu represitaj en aliaj publikaĵoj, ĉu paperaj, ĉu elektronikaj, sen permeso de la redakcio de LBE kaj ĉiaokaze sen fontindiko.

ĈU KOINCIDE, ke en la nuna numero de *LBE*, en tri apartaj raportoj pri aŭtunaj Esperanto-eventoj, la aŭtoroj atentigas pri mankanta publiko, kio siavice minacas la estontecon de la koncernaj aranĝoj? Temas pri la Internacia Renkontiĝo en Aylesford, la Buchanan-prelego ĉe la Universitato de Liverpolo, kaj la diskutronda sesio (drondo) en Sheffield. Malsamaj lokoj, malsamaj kialoj: sed la sama rezulto. Ne eblas okazigi eventojn, kiujn la publiko - malgraŭ anoncoj monatojn antaŭe pri datoj kaj lokoj - ne ĉeestas.

Povas esti, ke tio, kio estas proponata dum eventoj tiaj, ne plu kongruas kun la deziroj aŭ la bezonoj de esperantistoj. Pri la drondo-sesio en Sheffield, eble lokaj cirkonstancoj ludis rolon. Paralela sesio en Londono pli sukcesis: ŝajnas, ke oni ja volas diskuti temojn esperantajn kaj neesperantajn en la internacia lingvo.

Sed ĉu tio sufiĉas? Ĉu estas bezono pri malpli formalaj aranĝoj (ekzemple komuna regiona/federacia manĝaĵo kun la eblo simple babili)? Aŭ ĉu oni deziras ja pli formalajn eventojn, kun ekzemple lecionoj pri gramatiko, la historio de Esperanto, ties socio aŭ

Pri progreso kaj tajdoj

literaturo, preparado por KER- aŭ aliaj ekzamenoj?

Eble helpus al organizantoj scii, ĉu tio, kion ili ofertas, fakte kongruas kun nunaj voloj - sendube Viv O'Dunne ĉe la EAB-oficejo en Barlastono volonte ricevos viajn proponojn kaj komentojn por transdoni al la organizantoj de la diversaj kursoj kaj eventoj. Aŭ jen eble vana demando: la respondoj verŝajne ne indikos firmajn tendencojn sed spegulos unuopajn interesojn malfacile en publikaj forumoj realigeblajn. Povas esti, evidente, ke iom post iom ni perdos la fizikajn renkontiĝojn, inkluzive de tradicia ĉiujara kongreso brita, akceptante, ke la esperanta movado ja moviĝas al virtuala (kaj vigla) elektronika ekzisto. Domaĝe, de la vidpunkto de persona kontakto, sed necesas foje flui kun la tajdoj de progreso. Se, entute, temas vere pri progreso.

Aliflanke nepras kun ĝojo noti, ke la marta Buchanan-seminario en Liverpolo allogis tiom da homoj, ke fine ne eblis akcepti pli da interesatoj. Tio indikas, ke jes ekzistas intereso pri seriozaj, science strukturitaj esplorsesioj pri

la lingvo, kulturo kaj literaturo de Esperanto. Do ni ne senesperu!

La tajdo-metaforo memorigas, ke nenio restas senŝanĝa. Do mia propra tajdo pelas min for de la strandoj de *La Brita Esperantisto*, kie mi agrable vadas dum 15 jaroj. Tamen la numero, kiun vi nun legas, estos la lasta de mi redaktita. Dum mia redaktoreco mi kontentas pri kelkaj aferoj, malkontentas pri aliaj.

Aparte plaĉas la fotoj, kiuj, kun la nomoj de la fotitoj, pri kio mi insistas, helpas al venontaj generacioj de historiistoj identigi aktivulojn en la movado. Plejparte mi mem faris la fotojn kaj kelkajn mi fiere memoras: John Wells, akordeonon ludanta, aŭ Marjorie Boulton kun John Francis dum skota kongreso en Peebles (aŭtuno 2004); Ionel Oneț apud la strat-ŝildo "Esperanto Way" en Stoke-on-Trent (printempo 2005); Marjorie apud la busto de Zamenhof ĉe Wedgwood Memorial College (aŭtuno 2010); kaj la grup-fotoj, kiuj aperas ofte dorsflanke de la revuo.

Ankaŭ pri la rubriko "Kiu kiuas ...?", kiun mi iniciatis, por ke ni konatiĝu kun niaj membroj kaj aktivuloj, mi kontentas (kaj volas danki al Joyce Bunting, kiu fidele kaj diligente realigas mian ideon); same pri la buntaj kaj tre variaj artikoloj de Jack Warren, kiuj, kiel oni informas min, tre popularas.

Tamen ne ĉio tiel sukcesis. Ne prosperis al mi entuziasmigi pri traduk-konkurso, kaj krom la rakontoj de Joyce – denove! – kaj foje de du-tri aliaj, mi bedaŭras, ke ne regule aperas pli da rakontoj de aliaj aŭtoroj. Cetere miaj provo kuraĝigi kurs-organizantojn, grup- aŭ federacio-sekretariojn priraporti eventojn, kiujn ili okazigas, aŭ eĉ partoprenantojn sendi raportojn, plejparte fiaskis. Hodiaŭ estas pli facile fari kelkajn fotojn, aperigi ĉe Fejsbuko, kaj jen fino de la afero. Tiel tamen ne kaptiĝas la tuto de tio, kio okazas en esperantaj rondoj en Britujo.

Lastatempe mi akiris la impreson, ke, se mi mem ne ĉeestos eventon, neniu sendos raporton. Tiel batali, kontraŭ silento, indiferento aŭ Fejsbuko, estas unu el la kialoj por rezigni pri la redaktoreco. Bezonatas energio, kiun mi ne tiom abunde kiom antaŭe posedas.

Nepras danki al Simon Davies, la kompostisto de *LBE*, kiu la artikolojn enpaĝigas, la fotojn aranĝas, la tajperarojn elsarkas, kaj kiu funde komprenas la teĥnikajn aspektojn de la aperigo de nuntempa revuo, kiuj al mi pli kaj pli fremdas. Ni bone, mi preskaŭ emas diri modele, kunlaboris. Do al Simon sincerajn dankojn, kaj al mia posteulo – kaj al *LBE* – sukceson, prosperon kaj

DENOVE Esperanto-Asocio de Britio finance kaj surloke subtenis la Internacian Lingvan Festivalon en Sheffield, pasintan novembron. **Tim Owen** kaj **Ian Carter** dividis la instruadon, la unua per du sabataj sesioj kaj la dua per du dimanĉaj.

Kiel kutime la studentoj bone ricevis Esperanton. Kaj ĉi-fojon ili ne tiel rapide kiel kutime forgesos ĝin. La skipo de la Internacia Student-Unuiĝo dum la tuta jaro fiere portos sur siaj ĉemizoj la devizon de EAB. ■



legantojn.

Kaj fine ... sendube kelkaj estos rimarkintaj, ke mi ekŝiĝis kiel EAB-prezidanto. Pluras la kialoj. Mi diru simple, ke, aviĝinte en la pasinta jaro, mi volas (kiel anoncis pekintaj politikistoj de la Thatcher-epoko) pasigi pli da tempo kun mia familio. Espereble mia nepo min benos. Iam.

Cetere mi daŭre laboros por Esperanto, kiel ĉef-redaktoro de *Monato*, kiel verkisto kaj esploristo,

aparte pri originala dramarto.

Lastatempe mi estas reelektita al Akademio de Esperanto kaj mi restas ano de la juĝ-komisiono por la belartaj konkursoj de UEA kaj por la konkurso “Romanoj el ĉiuj ĉieloj”. Mi daŭre instruos Esperanton, ekzemple dum la barlastona somerlernejo (notu la datojn: 13-a ĝis 14-a de aŭgusto).

Al tiuj, kiuj min voĉdone kaj alimaniere dum mia prezidanteco subtenis, mi tutkore dankas. ■

Kiu kiuas ... en la brita Esperanto-movado?

Malcolm Jones

JB Saluton, Malcolm. Ĉu preta por respondi demandojn?

MJ Jes, tute. Mi ĵus preparis panpaston, kiu ŝvelos dum ni parolos.

JB • Oni diras, ke knedi panon trankviligas la spiriton – ĉu?

MJ • Ŝajne jes – mi neniam enuas pri panbakado, kion mi praktikas jam dum pli ol 36 jaroj ... pli longe ol mi estas esperantisto – nur 32!

JB • Ĉu vi multe kuiras? Ĉu tradician anglan aŭ internacian kuiradon?

MJ • Mi devas konfesi, ke ne – mia edzino tiel bone regalas min per bonegaj diversstilaj manĝoj el multaj naciaj tradicioj, ke mi ne kuraĝas malaltigi la kvaliton. Kiel studento, kaj poste, kiam estis vera bezono, mi jes

iom sukcese kuiris tradiciajn manĝojn. De tempo al tempo mi bakas aliajn gistopastaĵojn, kaj fieras pri miaj lunarkaj bulkoj.

JB • Mi scias, ke muziko kaj *morris*-dancado plaĉas al vi. Bonvolu klarigi.

MJ • Mi ludas fluton klasikstile kaj foje ludis popolmuzikaĵojn. Mi bedaŭras, ke mi ne lernis pianon, kiam juna, sed kiel studento mi iomete ludis gitaron, por akompani amikojn dum kantado. *Morris*-dancadon mi lernis en Chippenham pro la tiea ĉiujara festivalo.

JB • Ĉu vi daŭre partoprenas en *morris*-dancado?

MJ • Malofte nun, ĉar tio vere apartenis al mia vivo en Chippenham – en Skipton mankas tiu sama *morris*-stilo, kaj mi ne emis lerni alian, sed foje mi ricevas inviton de la “malnova grupo” aliĝi por iu aparta evento.



Ekzemple dum 2010 mi povis kunvojaĝi al festo en Blain en Francujo, kaj mi aranĝis renkonti esperantistojn tie. Hazarde, io simila probable okazos ĉi-someron.

JB • Vi ankaŭ kantas, ĉu ne?

MJ • Mi ĉiam kantis en lerneja ĥoro. En Oksfordo mi bonŝancis kanti kun Bach-ĥoro, sub gvidado de Simon Preston. Poste, kiam mi loĝis en Germanujo, mi aliĝis al Hamburga Instruista Ĥoro. Nuntempe mi estas membro de loka “ĉambra ĥoro”, kiu prezentas koncertojn tri-kvin fojojn jare; kaj ĉi-aŭtune mi denove membras en manĉestra ĥoro por koncertvojaĝo al Slovenujo. Jam kun ili mi kaj mia edzino vizitis Rumanujon kaj Islandon – kaj ambaŭkaze mi renkontis esperantistojn.

JB • Nu, kiel vi esperantistiĝis?

MJ • Mi unue aŭdis pri Esperanto supozeble pro UK en Harrogate en 1961, sed mankis tiam kuraĝigantoj. En 1984 mi legis leteron de Albert Lindsay en loka, Chippenham-a ĵurnalo pri la brita kongreso en Weston-super-Mare kaj pri lernado per senpaga kurso. Tio interesis min. Albert korektis miajn lecionojn kaj, dum mi plulernis, uzante *Teach Yourself Esperanto* kaj aliajn instrulibrojn, li kontaktigis

Joyce Bunting
telefone parolis kun
Malcolm Jones en januaro.

min kun Alan Shrives, tiel ke ni starigis neformalan konversaciorondon en Chippenham. Danke al ili mi parolis telefone kun David Curtis. Grade mi konatiĝis kun multaj esperantistoj el la regiono.

JB • Ni ŝuldas multon al tiuj homoj, ĉu ne?

MJ • Certe – mi dankas aparte al Albert pro lia bonega enkonduko ne nur al la lingvo sed ankaŭ al la movado ĝenerale, kaj pro lia posta subteno de mia agado. Mi plustudis ĉe *The Hill* en Abergavenny en '84, kiam mi ĝuis la superan kurson de John Wells. Mia unua ĉeesto en universala kongreso en 1985 en Augsburg tute kuraĝigis min. La kuniga solidareco inter diverslandaj partoprenantoj cementis mian esperantistecon.

JB • Ĉu vi iris al Lillo lastan jaron?

MJ • Jes, tio estis mia naŭa UK, kaj mi tre ĝuis ĝin. Ĝi multe impresis min pro la densa arta programo kaj nekutime vasta agado ekster la kongresejo por informi la ne-esperantistan publikon. Bonega estis la rekuniĝo de amika

kvaropo, kiu unuafoje stariĝis dum ILEI-konferenco en 1998, sed de tiam neniam ĝis 2015 komplete rerenkontiĝis. Estis ankaŭ plezure revidi Sergei kaj Lidia - amikoj de barlastonaj somerkursoj, kaj ĉeesti la kortuŝan "aŭtoran duonhoron", gvidatan de Barbara Pietrzak, kie Marjorie Boulton povis rikolti dankan agnoskon kaj belajn rememorojn de multaj siaj amikoj kaj admirantaj legantoj.

JB • Ĉu vi ĉiam estis instruisto?

MJ • Jes, pri lingvoj. Kiel vicedstro de lingva fako mi devis foje plene anstataŭi ties estron - kio fine plifortigis mian emon "resti en la klasĉambro" kaj ne iĝi administranto.

JB • Ĉu vi instruis Esperanton en lernejoj?

MJ • Jes. En '85, mi komencis instrui Esperanton al gejunuloj dum lernejoj lunĉpaŭzoj. Ili almenaŭ iom lernis kaj eksciis pri la lingvo, eĉ se ili ne poste daŭrigis. Tio estis en Chippenham. Kiam mi reiris al Skipton, mi instruis Esperanton sammaniere en la nova lernejo, sed kun iom pli da sukceso. Mi estis kontenta, ke ses knaboj venis al la malfermo de Esperanto-Domo en Barlaston 2002. Kaj el tiuj, tri vojaĝis kun

mi al la gotenburga UK en 2003.

JB • Ho, jes, mi memoras ilin - ili tre ĝuis. Ilia unua eksterlanda vojaĝo, ĉu ne?

MJ • Ĝuste. Ili renkontis Renato Corsetti en Barlastono kaj ĝojis re-renkonti lin en Gotenburgo. Ili ankaŭ mallonge intervjuiĝis por Pola Radio.

JB • Kio por vi estas memorinda momento en via Esperanto-vivo?

MJ • Mi elektu inter multaj. Dum iu UK mi, kiel kutime, aliĝis al Internacia Koruso. Mi hazarde staris apud alia baskantanto - japano; en si mem, nenio tre eksterordinara por ni. Tamen tiu viro estis blinda: li lernis la semajnan repertuaron, brajliginte la ekzercatajn muziknotojn kaj tekstojn, kaj li tiam kantis, legante sian brajlaĵon. Mirinde!

JB • Ĉu via edzino interesiĝas pri Esperanto?

MJ • Bedaŭrinde ne - sed ŝi tute subtenas mian okupiĝon pri ĝi, inkluzive gastigadon por Pasporta Servo, kaj ŝi mem profitis de tio. Mi instruis niajn infanojn kaj ili iomete parolis, sed vere ne interesiĝas. Tamen, mi amikiĝis kun kelkaj eksterlandaj

esperantistoj, kaj kiam ni povis viziti ilin, ili ĉiĉeronis por ni.

JB • Kie vi renkontis vian edzinon/karulinon?

MJ • Ĉe tradicia festivalo pri kampara vivo – *Malham Show*: estas pluraj tiaj en la valoj de Jorkŝiro. Pro komuna amiko Barbara kaj mi renkontiĝis tie je la unua fojo, en 1971, kiam ni jam estis universitatoj, kvankam ni ambaŭ loĝis longe en Skipton – mi denaske – kaj ni frekventis najbarajn gimnaziojn.

JB • Kiamaniere vi profitas de Esperanto?

MJ • Krom la multaj novaj personaj kontaktoj kaj multnaciaj amikoj, Esperanto malfermis miajn okulojn al aliaj landoj kaj pensigis min pri lingvoj aliaj ol tiuj, kiujn mi jam konis kaj instruis. Mi povis ankaŭ gustumi la plezurojn de aktorado.

JB • Kiel vi propagandis por Esperanto?

MJ • Mi starigis en Chippenham kaj poste en Skipton lokan grupon, pri kiu mi aperigis artikolojn en lokaj ĵurnaloj, kaj foje ni kunmetis ekspoziciojn. Daŭre, jam de multaj jaroj, mi kontrolas la lecionojn de korespondaj lernantoj en la kursoj



de EAB, kaj laŭokaze kontrolas ankaŭ iliajn ekzamenojn (kio bedaŭrinde ne tre oftas nuntempe). Mi ankaŭ kunlaboris/-as ĉe ETA kaj ILEI; pri porinfanaj materialoj *Urso-Kurso*, *Springboard*, *Comenius*-projekto; pri la koresponda kurso “*Elementary...!*”; kaj pri la ĉeestaj kursoj de EAB *Course You Can / Lernu!*, kaj ĉe Somera Festivalo, k.t.p.

JB • Kio, laŭ vi, estas la plej granda defio por Esperanto?

MJ • La ĝenerala publiko ne scias pri Esperanto kaj eĉ ne konstatas, ke ekzistas lingva problemo. Ili opinias, ke la angla solvos ĉion.

JB • Kaj la plej granda eblo?

MJ • Nuntempe, lernado ĉe *Duolingo* – la tre populara retejo por lerni lingvojn pere de la angla. Chuck Smith verkis la esperantan version.

JB • Nu, ĉu vi fieras, ke Esperanto furoris en Britujo unue en Jorkŝiro? Mi aŭdis, ke la unua E-klubo fondiĝis en Keighley. Al kiu klubo vi unue aliĝis? Ĉu vi estas membro de ia klubo nun?

MJ • Mi ĝojas, ke Esperanto aperis ankaŭ en nia lando; ne multe gravas, kie unue. Krom aliĝi al EAB kaj do per tio al la loka federacio, mi aliĝis nur al kluboj, kiujn mi starigis. Mi foje vizitis klubojn en Bristol, Manĉestro (du *PIV*-aj nomoj), Keighley, Wakefield kaj Bradford.

JB • Kiu homo plej influis vian vivon?

MJ • Nu, kredeble mia unua lernejestro. Li vidis iun mian kapablon kaj konvinkis miajn gepatrojn plu kuraĝigi min diligente lerni kaj studi.

JB • Kiu estas via plej malbona trajto?

MJ • Dependas, kiu prijuĝas. Ĉu mi vere tro ŝercemas kaj vortludas? Miajn edzinon kaj amikojn precipe

ĝenas, kiam mi (jam denove ...) kaptas okazon paroli pri Esperanto.

JB • Kiu trajto ege ĝenas vin en aliaj homoj?

MJ • Min ĝenas la egoisma – eĉ danĝera – konduto de kelkaj aŭtistoj, kaj aparte, kiam mi mem troviĝas surbicycle.

JB • Kio en via vivo estas la plej ŝatata donaco, kaj kiu donacis?

MJ • Nu, ni havas du filojn kaj du genepojn. Jen belaj donacoj. Krom tiuj mi devus elekti inter la unua “vera” biciklo, kiun donacis al mi onklo, kiam mi sukcesis en la ekzameno por vizitadi gimnazion, kaj la *Oxford Companion to Music*, kiun donacis lerneja amiko je mia 21-jariĝo ... tiun mi ankoraŭ uzas, sed ne plu la unuan biciklon.

JB • Se vi gajnus milionon da eŭroj, kiel vi uzus?

MJ • Nu, mi aĉetus domon sur ebena tereno, pli praktikan por mia malsana frato. Kaj mi plu – pli grandskale – subtenus esperantistojn en Afriko. Mi konas muzikiston en DR Kongo, kiu provas registri proprajn Esperanto-muzikaĵojn, kaj por tion ebligi li komencis bredi kokinojn; kaj en Tanzanio, nia grupo jam

helpis aĉeti radio-aparataron por komunuma elsendado, sed restas multaj aliaj subtenindaj projektoj.

JB • Ĉu vi estas verdulo?

MJ • Mi ne estas vegetarano, sed mi provas vivi modeste, sen troa ŝarĝo por la medio – ni ŝparas, reuzas, recikligas – sed estas tuja kontraŭdiro, ĉu ne, por esperantisto, kiu iom ofte longe vojaĝas? Mi kaj mia edzino ne estas “konsumantoj” de multo: ni ne kaptiĝas de moderna reklamado kun ĝia premo tuj

Malcom Jones naskiĝis en 1949 en Skipton, Jorkŝiro. Li studis la francan, germanan kaj latinon ĝis A-nivelo. Li eklernis la rusan en vesperkurso en Skipton. Studinte ĉe Worcester College, Oxford University, li gajnis licencion *BA Hons* pri modernaj lingvoj (germana kaj rusa) kaj sekve pedagogian PGCE.

Lia unua laboro post universitato estis kiel instruisto pri la angla en hamburga gimnazio dum du jaroj. Reveninte al Britujo, li enposteniĝis en ĝenerala mezlernejo (*comprehensive*) en Chippenham, kie li enkondukis la germanan. Post translokiĝo reen al Skipton en 1992, li instruis precipe la germanan ĝis emeritiĝo en 2008. Li nun loĝas en Skipton kun edzino Barbara.

Li ricevis fratulecon de EAB en 1990.

aĉeti la plej novan ion – eble ĉar ni posedas nek televidilon nek “inteligentan” poŝtelefonon.

JB • Mi scias de propra sperto, ke vi estas simpatia, pacienca instruisto, kaj iu, kiu bonŝance studus en via grupo, progresus. Dankon, Malcolm, pro la konversacio.

MJ • Ne dankinde. Mi ĝojas, ke homoj ankoraŭ volas lerni! ■



PARDONU min, kara leganto, ke jam de kelkaj jaroj ne plu aperas kontribuaĵoj miaj en via valora kaj atlestimata revuo *La Brita Esperantisto*. Mia vivo intertempe fariĝis tre malfacila, preskaŭ neeltenebla. Mi klarigu.

Eble vi memoras, ke mi studis ĉe la renoma universitato de Birmingamo kaj intencis verki disertacion pri la kantemo de abeloj. Sed, ve, la abeloj malsaniĝis kaj mortis, la universitato ne renovigis mian kontrakton (malgraŭ miaj protestoj, ke eble nun la mortintoj kantas en ia abelo-ĉielo, se tia ekzistas, kaj do des pli valoras esplori), kaj finfine, malgraŭ tio, ke mi bone kondukis en via lando, paginte regule ĉiun monaton la luprezon de mia ĉambro, ellerninte la vortojn de ĉiuj strofoj de via bela kaj inspira nacia himno, kaj provinte aĉeti ĉiam britajn varojn - malfacile, kara leganto, ĉar ĉio, inkluzive de vestaĵoj, bicikloj, skribiloj kaj ankaŭ ŝtalo kaj ŝajne atomcentraloj estas aŭ estos fabrikitaj en Ĉinujo; kaj aviadilo-ŝipon, kiun vi ja ĉi tie konstruas (tamen en Skotujo, por komplezi al viaj morozaj nordaj najbaroj) mi ne deziras, dankon ... nu, fine, imagu!, malgraŭ ĉio ĉi, la registaro deklaris min (ĉar mi

devenas, kiel eble vi bonvolus memori, de Palestino, do de Meza Oriento, aŭ Teroristujo, kiel oni emas ĝin vulgare nun nomi) malamiko de la ŝtato kaj rifuzis renovigi mian vizon.

Ve! Kia katastrofo! Mi protestis, dirante, ke Palestino ne estas Sirio aŭ Irako aŭ Irano, sed vane. Mi bedaŭras, kara leganto, ke viaj funkciuloj, homoj alte edukitaj, sendube kun universitataj diplomoj unuaklasaj (nuntempe duaklasa diplomo same utilas kiel eluzita fiŝ'-kaj-frit'-envolvaĵo, dum triaklasa retenas nur komedian valoron), posedas eĉ ne la plej etetan scion pri la geografio de mia regiono kaj do farbigas nin, do tiujn kun iom ombra haŭtkoloro kaj sen akĉento reĝine angla, per la sama terorista peniko. Fakte, kara leganto, kvankam mi ne volas insulti viajn respektindajn funkciulojn (kiuj estas nuraj lakeoj de viaj fremdulo-malamikaj politikistoj), mi tamen vere opinias, ke tiuj ĉi homoj tute sincere kredas, kiel iliaj politikaj mastroj, ke komenciĝas Teroristujo, se ne paroli pri mia kompatinda Palestino, jam en Kalezo. Aŭ eble Bradford aŭ Notting Hill.

Pardonu min, kara leganto, mi deflankiĝas. Psikiatro prave dirus,

ke mi deflankiĝas, ĉar pensi pri la realo, akcepti la veron, de mia nun mizera ekzisto tro dolorigas. Ĉar, imagu!, la funkciuloj, forpreninte mian vizon, volis min elpeli el via bela lando kaj resendi min – jes ja, mane katenitan, mi vidis en la televido – per aviadilo, “hejmen”, kiel ili diris, al la lando de miaj prapatroj – la profeto ilin benu.

Tamen jen, jen ĉi tie mia hejmo, kie mi dum jaroj pace kaj amike kun vi kunvivis kaj kie mi intencis, kiam estos ordonite, elgliti el tiu ĉi mondo en la pli bonan, kiu nin ĉiujn atendas. Do, ho ve, min elŝtatigi ili volis, kondukis min al speco de prizono, kun dekoj, centoj, da aliaj mizeruloj – ĝis mi, jes mi, kiu neniam malobeis, pekis, krimis dum vivo pli blanka ol la neĝo, kiu pro monda varmigo ne plu falas sur viajn montegojn (krom en Skotujo, kiun ni ne plu konsideros, ĉar ĝi jam mense se ankoraŭ ne politike sendependiĝis, kun nafto nun preskaŭ senvalora kaj viskio-industrio apartenanta pli ol duone al anglaĉoj kaj aliaj senkiltaj nekeltoj) – vidu, mian fadenon mi perdis, ho, jes – do unue kaj unike en mia vivo mi enmanigis al mi la leĝon kaj fuĝis, ne tre originale, en korbo da malpuraj littukoj, el la prizono, por ke, kara leganto, mi restu ja kontraŭleĝe, bedaŭrinde, tamen inter vi kaj en via amata lando, mia spirita hejmo.

Mi ne pretendas, ke la vivo facilas. Kaŝe, sub la radaro, mi vivetas, helpate de bonkoruloj (jes, esperantistoj), kiuj min kvazaŭ pakajon sendas de sekurejo al sekurejo, por ke la aŭtoritatoj kaj foje mi mem ne scias, kie mi estas. La nomojn de la bonkoruloj mi ne malkaŝos, kara leganto – mi scias, ke vi ja silentus, se mi dirus, sed laŭdire en viaj rondoj (in)sidas homoj malpli fidindaj, kun langoj malligitaj, fiportantoj de konfidencaĵoj, ho ve.

Sed mi ne tute senesperas, ĉar viajn samlandanojn mi respektas, sciante, ke iam ili vidos, ke ili maljuste kontraŭ mi agis, taksante min teroristo kaj provante min elŝtatigi. Intertempe, laŭ la zamenhova proverbo, okazon mi kaptas ĉe l’ kapo, ĉar la vosto estas glita, kaj mi planas miajn venontajn post-abelajn esplorojn, por ke iam mi reiru en gloro al la universitato por finfari miajn studojn.

Tamen sci – kaj pardonu min, ke mi, sensignifa kaj akuzative kaj partecipe/-ape/-ope pekanta esperantisto, arogas al si la rajton kritiki nian senparalelan majstron, la neforgeseblan doktoron Zamenhof – al lia memoro benojn kaj kisojn el mia buŝo neinda – sed la proverbo eraras. Ne glitas la vosto, sed de scienca vidpunkto pleje studindas la zamenhova vosto – nu, ne lia, kia herezaĵo!, sed lia

proverba – ĉar, imagu!, la vosto fariĝis la subjekto de miaj nunaj reserĉoj.

Ĉu vi rimarkis, kara leganto, kiel kato, sidanta, volvas la voston jen dekstren, jen maldekstren ĉirkaŭ la korpo? Nu, mi teoriumas, ke, kiel ekzistas dekstramanaj aŭ maldekstramanaj dupieduloj, ekzistas dekstravostaj aŭ maldekstravostaj kvarpieduloj.

Alivorte, estas sidantaj katoj, kiuj inklinas dekstre volvi la voston, aliaj, kiuj inklinas maldekstre ĝin volvi. Tiel, kara leganto, mi volas pli intime kompreni la bestojn, kun kiuj ni dividas nian etan mondon.

Konsentite, miaj esploroj staras nur en la unua fazo, dum necesas pliaj ja laboratoriaj testoj. Poste nepros esplori kaj mezuri en la kampo, kiel diras ni sciencistoj (kio kreos problemojn, ĉar katoj ĝenerale ne kampemas, kiel ŝafoj aŭ bovoj, sed ĝardenemas, aŭ fotelemas), kaj do pro tio mi anticipas sufiĉe longan kaj penigan esplorprogramon.

Nu, ĉio ĉi, kara leganto, kostos multe da mono (por ne paroli pri miaj konstantaj veturkostoj, loĝado

en diversaj kaŝejoj – mi povas diri, ke la teorie fermita kolegio en Barlastono ankoraŭ tre komfortas: la stultuloj ne malŝaltis la hejtadon, imagu!), kaj do se vi volos kontribui, nu, sufiĉas nur etaj mondonacoj, vi povos ilin sendi al la konto *Katvosto* ĉe EAB, kies administrantino, la ĉarma kaj ĉiel kompetenta Viv O'Dunne, volonte mianome enkasigos la monon. La nepoj kaj katoj vin benos, kara leganto.

Restas mia plej forta deziro vin saluti dum la brita Esperanto-kongreso en Liverpolo; mi tamen dubas, ĉu tio eblos. Prezenti min en publikaj lokoj tro danĝeras. Sed mi deziras al vi benatan kaj fruktodonan renkontiĝon, kiun tutcerte spirite mi ĉeestos. Kaj intertempe, kara leganto, ne forgesu la konton. *Katvosto*, ĉe EAB. Nur etaj donacoj, vere. Se pli grandaj, mi ne plendos. Tute ne. ■



Kiel klarigas la aŭtoro, artikoloj liaj jam de kelkaj jaroj ne aperas en *LBE*. Antaŭaj kontribuajtoj troveblas ĉe la *LBE*-retejo:

esperanto.org.uk/lbe



Tiuepoka foto pri **Geoffrey Sutton** (dekstre) kun **Ulrich Lins** sur ŝtona kamelo.

MI ESTIS ĉe la fino de mia restado en Japanujo. Laborinte jaron en Pekino kiel sub-redaktoro ĉe la Fremdlingva Eldonejo por la periodaĵo *El popola Ĉinio*, mi laŭ peto de japanaj esperantistoj jam pasigis sep monatojn en ilia lando. Mi diversmaniere helpis la movadon, sed ĉefe per prelegoj kun lumbildoj pri la vivo en Ĉinujo. Krome, mi pasigis du semajnojn en Suda Koreujo, kie mi ankaŭ alparolis kun interpretado kunvenojn de studentoj. Ĉi tiuj allogis multegajn homojn, ĉar tiutempe oni devis

aparte peti de la aŭtoritatoj permeson paroli pri Ĉinujo, do la intereso estis granda.

Mi preparis min por baldaŭ forlasi Japanujon.

Dum mia restado mi amikiĝis interalie kun japana junulino. Takako estis profesia interpretisto franca-japana. Ŝi flue parolis Esperanton. Ŝi ankaŭ unufoje vizitis min por semajnfino, kie mi loĝis, apud Toyota. Tie japana esperantista paro pruntis al mi dometon.



Foje, kiam mi vizitis la paron, la viro seriozmiene turnis sin al mi kaj demandis: “Ĉu vi komprenas, ke japanaj virinoj kutime ne tiel kondutas?” Mi respondis, ke mi jes jam komprenas tion, kaj ke ni nur bone amikas; ŝi estas iom

Geoffrey (maldekstre) kun kolegoj.



eŭropiĝinta. Ŝi loĝadis en Francujo, kaj antaŭ nelonge verkis japanlingvan libron kun la titolo *Sep jarojn en Strasburgo*.

Iam dum sia vizito Takako rakontis, ke ŝi pensas vojaĝadi. Ŝi volis

ĉirkaŭveturi per la aŭtobusoj *Greyhound* tra tuta Norda Ameriko. Ŝi tamen ankoraŭ ne decidis pri datoj, nek pri cellokoj.

Estante ekforironta el Japanujo, mi kompreneble volis ĝisi al Takako. Mi telefonis al ŝi. Neniu

respondo. Mi tranoktis en Tokio antaŭ la ekflugo; ankoraŭ neniu respondo al telefonvoko. Oni ne sciis, kie Takako troviĝas.

Mi forflugis al Vankuvero kaj spertis la amuzan travivaĵon alveni unu tagon antaŭ ol mi foriris - do, frazo kiel “Mi forveturis morgaŭ” povis esti ĝusta! Sur la apuda insulego laŭ tiu sama nomo loĝadis kuzino de mia patro (filino de praonklo, kiu elmigris



Skribotable ĉe El popola Ĉinio.

Kanaden en la '20-aj jaroj). Ŝi venos renkonti min en la flughaveno, kaj ni du pramveturos al la insulo.

Ni du sidadis inter la homamaso sur ferdeko de la pramŝipo kaj babiladis. De tempo al tempo mi alrigardis la homamason, sidantan kaj irantan tien kaj reen dum la ŝipveturado. Miaj okuloj ekfiksiĝis ĉe junulino. Embarasete mi tuj forglitigis la rigardon. Denove la okuloj troviĝis ĉe ŝi, kaj ŝi iom longete rigardadis min. Okuloj formoviĝis. Ŝi aspektas kiel ... ne eblas. Denove rigardetas; tamen neniel eblas finfine. Jam venis la horo por elŝipiĝi. La homoj disiris ĉiu sian vojon.

Ni jam atingis la aŭtoparkejon,

sed apude mi aŭdis vortojn en Esperanto, turnis min kaj tie ja marŝis Takako. "Kion vi faras ĉi tie?"

"... kaj kion vi?"

Ŝi estis kun loka delegito de UEA. Necesis fulmorapidaj klarigoj, interŝanĝo de telefonnumeroj.

Montriĝis, ke ŝi intencas postmorgaŭ pluveturi, do ni decidis pasigi la sekvan tagon kune en Viktorio.

Tio estas la plej granda koincido de mia vivo. Takako povintus troviĝi ie ajn en Usono, Kanado aŭ Japanujo, sed ŝi veturis sur la sama pramo je la sama horo, kaj eĉ sur la sama ferdeko. Bonvolu elkalkuli la probablecon! ■

Mistero de la mankantaj virinoj

SUPER KAMPO kaj kanalo ŝvebas nebulo. Frumatene dense; eĉ tagmeze nur ie-tie trapenetas pala oktobra suno. Apenaŭ videblas la pinto de la katedrala turo, dum sube, sur la stratoj, en la ombroj de la antikvaj muroj, peze pendas en la aŭtuna aero la spiro de la preterpasantoj, kontraŭvole alkutimiĝantaj denove al paltoj kaj manteloj, jakoj kaj anorakoj. Kaj ne rimarkintaj, ke malaperis la virinoj.

“La leĝo de altiro ... aŭ, se vi preferas, allogo,” klarigas Harry Barron, gastpreleganto dum la oktobra kaj senvirina kunsido en Ĉestro de la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio (NOEF). “Se vi volas, ke io okazu, viaj pensoj sufiĉe fortas ... jen almenaŭ la teorio ... por ĝin realigi.”

Aŭ ĉu inverse? Ĉu sidas en la federacia ĉambro iu, kiu ne volas, ke aliĝu virinoj? Ĉu tio klarigas, kial - kiel en la pasinta jaro, kiam la polico en Ĉestro serĉis anojn de

stranga sekto vira, babilanta en stranga lingvo (vidu *LBE* 978) - mankas al la rondo virinoj?

Do ne kulpas la nebulo, kiu iel englutis federacianojn ... kulpas la leĝo de altiro aŭ, efektive, malaltiro. Se eblas, ke, pensante, oni ion ebligu (riĉaĵon, sanon, kuracadon), do eblas ankaŭ, ĉu ne, ke, pensante, oni ion malebligu?

“Ekzemple,” daŭrigas la preleganto, “eksperimento montris, ke eblas kreskigi pli bonan tomaton, se oni ĝentile kaj pozitive alparolas la planton, ol se oni ĝin insultas.”

Do jen. Iu, eventuale sekrete, insultis virinojn kaj do ili ne volas “kreski” en la federacia laboratoria pototo ... certe ne dum kunveno. Pro tio ili forestas kaj ĉirkaŭas la tablon nur viroj.





Richard Phoenix, Harry Barron, Brendan Marsh, Eric Smith, Mike King, Peeter Aitai

Do nun mi komprenas ... sed momenton! S-ro Barron, kion vi diras ... ? Vi mem *dubas* pri la teorio, pri la tiel nomata leĝo ... ? Vi estas nura mesaĝisto, raportisto, preleganto ... do vin ne pafu ...?

Nu, bone. Ni ne pafos. Sed jen federacia tasko por la venonta vintro. Pozitive pensi, voki al la kosmo por leĝe altiri virinojn al federaciaj kunvenoj. Federacianoj, vi scias, ke vi povas. Hodiaŭ tomatoj, morgaŭ virinoj. Kaj viaj kunsidoj plenplenos ...

Sed kial tie halti? Kial ne apliki al la tuta esperanta movado? Ŝrumpanta membraro ... afero de la pasinteco. Per la leĝo de altiro ĉiuj esperantistoj ekzercu siajn mensojn, apliku la povon de pensado, preĝado ... sekvos ne nur tomatoj kaj virinoj sed ankaŭ abunde novaj membroj (plene pagipovaj, memevidente).

La venonta Universala Kongreso

en Slovakio adoptu nur unusolan rezolucion: ĉiam ĉiel apliki la leĝon de altiro. Homoj ... meditu, viajn pensojn direktu al la kosmo, kaj la estonteco estos via! ■

[*Bv. memori, ke vi legis unue kaj unike en La Brita Esperantisto kiel realigi la finan venkon!* – Red.]



Harry Barron pensige prelegis pri la leĝo de altiro. Ĉu tiel solveblas la mistero de mankantaj esperantistoj? Nur pozitivu!

OKAZIS en oktobro kaj en Sheffield kaj en Londono du unutagaj sesioj de la paroliga “drondo”-kurso. Ĉeestintoj de la brita kongreso en 2014 en Sheffield certe scios, kial ni elektis la tiaman kongresejon *The Circle* por la unua sesio, kiu kostis nur £12 por partopreni. Malfeliĉe, tiu malalta monsumo, bela loko kaj averto en kaj la julia *Update* kaj en la reto sufiĉis por allogi nur du partoprenantojn, Jack Warren kaj Ian Carter.

Malsimila estis la rezulto por la dua sesio, okazinta en Londono. Kvankam tri homoj mendintaj lokojn finfine ne alvenis, ĉeestis tamen sep – ja sufiĉaj por bone diskuti la diversajn temojn. Leviĝis la unua surprizo, kiam ni diskutis la referendumon, ĉu resti en la Eŭropa Unio. Ne ĉiuj

volis. Kutime en similaj cirkonstancoj la drondestro alprenu



la rolon de advokato diabla, sed ĉi-fojon, ĉar la opinioj diverĝis, ne necesis.

Aliaj temoj inkluzivis “Ĉu vi volus esti centjaraĝa?”, kiu pritraktis la fakton, ke la nombro de homoj atingintaj tiun mejloŝtonon altiĝis de 107 en 1911

ĝis 6 860 en 2013; kaj “Ĉu la balotado en 2015 argumentas por reformo?”, dum kiu oni konstatis, ke por gajni unusolan seĝon la partio UKIP bezonis preskaŭ



Partoprenis la londonan drondo-sesion, de maldekstre, **Peter Redfarn, Mikaelo Sims, Mike Wade, Marteno Miniĥ, Terry Page, Anica Page kaj Penny Bryant.**

4 000 000 da voĉoj, dum la seĝoprezo por multaj aliaj partioj malsuperis 50 000.

Kaj fine ni diskutis admiratajn

esperantistojn, inkluzive de Marjorie Boulton (“Mi scias nenion pri poezio, sed konstatas, ke ŝi tiel varme traktadis tiel multe da homoj, kiuj havis nenion apartan

oferti al ŝi”), Tibor Sekelj, Petro Miles, Edmond Privat, Ito Kanzi (“dediĉis sian vivon al kompilado de la plena verkaro de la iniciatinto de Esperanto”), kaj Mária Minichova (kiu lernis Esperanton, ĉar ŝi volis pli bone respondi ol per simpla “Marteno ne estas ĉi tie” kiam la amikoj de la filo provis telefone kontakti lin, kaj kiu nun tre aktive laboras, kunorganizante la universalan kongreson en Nitro). Estis bone povi ne nur lerni pri konataj nomoj, sed ankaŭ aŭdi pri bonuloj, kiuj moviĝadis sendetekte.

Post la sesio, kelkaj grupanoj kunvenis en taverno kun lokuloj

(inter aliaj la nove en Londono instaliĝintaj Renato Corsetti kaj Anna Löwenstein) por plu esperantumi. ■



TREVOR STEELE estas unu el nia plej fekundaj kaj plej legindaj aŭtoroj. Lia lastatempe eldonita romano, *Dio ne havas*

eklezion, flue legiĝas kaj taŭgas kaj por esperanta literatur-amanto kaj por progresanto ekpaŝanta en la verdan libro-mondon.

Ne timu la titolon. La romano jes pritraktas religiojn – aŭ, pli ĝuste, kredojn – kaj en ĝi rolas romkatolika pastro (kun bela filino), episkopo kaj tiuj, kiujn oni eble emas nomi paganoj (efektive animistoj). Tamen, malgraŭ ie-tie (iom tro longaj) diskutoj pri spiritaj aferoj, dio nur fonas en la

Trevor Steele. *Dio ne havas eklezion*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2015. ISBN (papera versio) 978-90-77066054-6. Prezo ĉe FEL (e-libro) €6,90. 187p.

intrigo.

Male lia vasta eklezio, aŭ eklezianoj. La romano estas multe pli tradicia am-historio, kiu pritraktas la evoluantajn rilatojn inter “ŝtala” foto-ĵurnalisto kaj la pastro-filino. Samtempe sin prezentas kolizio de du mondoj: kapitalisma, ekspluatema turismo-industrio kaj pacama, fiŝkaptista insulo-popolo. Ne forestas aktualaj demandoj pri ĵurnalisma etiko kaj ekologiaj aferoj.

Argumenteble la romano ne estas la plej profunda aŭ verdire la plej pensiga, kiun verkis Steele. Tamen la aŭtoro bone rakontas, ĉi tie laŭ maniero, kiu memorigas pri István Nemere, kaj la romano retenos leganto-intereson ĝis la lasta paĝo. Varme rekomendita! ■ PG

LA SUBTITOLO de la gvidlibro jenas: “Konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj”. Kaj, verdire, multo pli. Ĝi enhavas A-Z de esperantaj faktoj kaj pli-ol-100-paĝan suplementon de zamenhofaĵoj, manifestoj, poemoj, rezolucioj kaj

literaturaj eltiraĵoj.

Do, ĉu vi scias, kio estas sisterona akuzativo? Ĉu vi konfuziĝas inter CDELI kaj CED? Ĉu vi scias, kio estas ISAC, ISAE, KSM aŭ TOLE? Ĉu vi gavalas, kajmanas, lacertas aŭ reptiliumas? Ho, ve ... kiu diras, ke Esperanto estas facila lingvo?

Aleksandro S. Melnikov. *Gvidlibro tra Esperantio*. Rostov-na-Donu, 2015. ISBN 978-5-98615-147-2. 527p. Prezo ĉe UEA: €39.

Respondoj al ĉi tiuj demandoj (eble ne la lasta) vi trovos en la bele prezentita (kun desegnaĵoj kaj fotoj) leksikono de Melnikov. Efektive ĝi estas pli ol nura leksikono: ĝi estas strange sorĉa apudlita legolibro. Elektu literon, antaŭ ol enlitiĝi, kaj poste sonĝu (se vi elektis la literon M) pri malfermaj tagoj, malsam-ideanoj, *mal*-vort-sinonimoj, manifesto 1977, manifesto de Prago, manifesto de Raŭmo ... kaj dormu profunde kaj esperante.

Sed ... ve. Makulas la leksikonon aro da ĝenaj misoj. Aperas *Zamenof* (p.8) kaj *Marjori Boulton* (p.15); okazis UK en *Harogate* (p.78); Cezaro Rossetti verkis *Kredu min*,

sionjorino! (p.180); kaj Ivo Lapenna “ne estis *reelktita*” dum la hamburga UK (p.184). Kaj jen nur komenco de longa listo tia. Eble Melnikov intence faris: speco de ludo por sproni leganton al plia, kaj funda legado.

Tamen, serioze, jen interesa ne nur konsultlibro sed ankaŭ legolibro. Ĉiu, ĉu spertulo, ĉu komencanto, trovos en ĝi ion freŝan, ion surprizan, ion pensigan. Gratulindas la aŭtoro pro la esploroj, pro la referencoj, pro la klarigoj. Kaj aĉetindas la gvidlibro donace al esperanta amiko aŭ vi mem. ■ PG




LASTATEMPE alvenis surscenejen anglalingva libro, kiu promesas doni enkondukon al Esperanto kaj ĝiaj rivaloj. Ĉi-lastaj en la libro estas Volapük kaj Ido, kaj en vero la libro koncentriĝas pri relative mallonga tempodaŭro. Bonegas, do, ke tiu periodo ankaŭ estas la plej interesplena en la ĝisnuna vivo de Esperanto – ĝiaj fruaj jaroj – kaj la libro ne celas instrui la meĥanikon de la lingvoj, sed la historioj.

Verkis la libron Roberto Garvía,

Roberto Garvía. *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. University of Pennsylvania Press, 2015. ISBN 978-0-8122-4710-7. 240p. Prezo ĉe Amazon: £37.

sociologo ĉe la universitato Carlos III en Madrido. Ja enestas ioma sociologa pridiskuto, sed tio neniel komplikas aŭ putriĝas la fluon de la libro, kiu baze estas historio de la planlingva kreado en la periodo ĉirkaŭ la alveno de la 20-a jarcento,



kaj la movadoj, kiuj subtenis la lingvojn kreitajn.

Gratulojn meritas la aŭtoro pro sia skribmaniero, laŭ kiu li faciligas la legadon. Vere,

tiel nature mi progresis, ke mi havis la impreson legi magazinan artikolon en ĉiu ĉapitro. Do Garvía meritas premion, tre sukcese transdoninte konstantan sinsekvon de informoj per minimumaj vortoj, tiel ke mi finlegis la libron dum la tago, en kiu mi ĝin komencis, ĉar neniam venis al mi la sento, ke min ĝi superŝutas.

La aŭtoro bone prezentas historian perspektivon, argumentante, ke tiu kvazaŭ manio por lingvoplanado hodiaŭ neimagebla ne estis siatempe flankula afero, sed racia respondo al intelekta problemo pri tiama tutmondiĝo. Aperis en relative mallonga periodo telefonoj, vaporŝipoj, telegramoj, kaj aliaj inventaĵoj, kiuj ebligis transliman komunikadon. Tute nature la pensemoj en tiuj tagoj esploris la demandon, kiun lingvon uzi en internaciaj situacioj.

La realo estas, ke la libro prezentas ene de kelkaj paĝoj tre

Carlo Minnaja, Giorgio Silfer. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro. 748p. Prezo ĉe UEA: €51.

interesan enkondukon en la fruajn tagojn de Esperanto. Ĝi ĉiel legindas, sed por tiuj, kiuj simple volas lerni pri la ekiĝo de Esperanto, ĝi ankaŭ perfekte taŭgas.

Nur unu erareton (aperantan du-foje) mi rimarkis: la aŭtoro komentas, ke en 1905 W. T. Stead kaj Felix Moscheles fondis la unuan Esperanto-societon en Britujo. Pluraj kompreneble scias, ke la unuan Esperanto-societon en Britujo fondis en 1902 Joseph Rhodes kaj John Ellis en Keighley; ankaŭ, ke la Londona Esperanto-Klubo (kiun ja fondis tiuj du pioniroj) kaj la Brita Esperanto-Asocio stariĝis respektive en 1903 kaj 1904. Sed mi kredas, ke ĉio alia en tiu informplena libro estas ĝusta.

Mi, interesato pri la fruaj tagoj de Esperanto, ne nur aparte ĝuis tiun libron, sed ankaŭ alte rekomendas ĝin. Nepras averti, tamen, ke ĝi sufiĉe multekostas. Eĉ la elektronika versio superas £35 pundojn. Enhave ĝi donas kontraŭ tiu prezo nur 160 paĝojn. Do laike verkita, akademie prezumita.

En la venontaj monatoj aperos almenaŭ du aliaj libroj pri Esperanto malpli kostaj. Se ili estos tiel interesaj kiel ĉi tiu, ili donos multan valoron. ■ TO

ANGLALINGVANOJ, kiuj interesiĝas pri esperanta literaturo, estas aparte dorlotitaj. Aliron ili jam havas al la mejloŝtona studaĵo de Geoffrey Sutton, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* (Mondial, 2008), kaj nun ankaŭ al la same impona, samtema sed alispeca *Historio de la esperanta literaturo*.

Ne estas la celo en tiu ĉi mallonga recenzo kompari la du verkojn: efektive la titoloj ĉion eldiras.

La volumo de Sutton estas ja enciklopedio, do detala konsultlibro pri la “grandaj nomoj” en la literaturo de Esperanto kaj ĉefe pri ties verkoj. La historio de Minnaja kaj Silfer estas precize tia: historio, do rakonto, en la plej vasta senco, de la literaturo (kaj ankaŭ de la lingvo kaj la socio, kiun ĝi generis) ekde la fruaj jaroj ĝis la nuna jardeko.

Ne permesu, ke la vorto “historio” vin fortimigu. Minnaja kaj Silfer klare (kaj klare) verkas, tiel ke oni apenaŭ rimarkas, ke oni estas elmetata al “historio”. La ĉapitroj mallongas, tiel ke eblas ilin sendolore gluti. Abundas fotografaĵoj kaj aliaj ilustraĵoj, kaj la lingvo glate kaj facile fluas.

Ĝis la fino de la volumo troveblas specimenaj tekstoj de konataj kaj malpli konataj aŭtoroj. Argumenteblas, ke la paĝoj dediĉitaj al tiuj ĉi legaĵoj povus esti pli efike uzataj por pli funde analizi menciitajn verkojn.

Ekzemple, en paĝoj pri la hungara aŭtoro István Nemere, troveblas iom da kritiko (“la kvalito aŭ la inventemo estas fojfoje nekontentiga: tro rapida verkado kun ioma neglekto pri polurita formo” [p. 390]), kiu ne kunligiĝas al specifaj eroj en la romanaro. Estus interese vidi, kie kaj kiamaniere estas neglektita la polurita formo. Anstataŭe, kiel foje en volumoj pri literaturo-historio, legeblas resumoj pri la intrigo, kaj malpli analizoj pri enhavo kaj formo.

Jen persona vidpunkto, kiu neniel senvalorigu la gravecon de *HEL*. Ke enestas mankoj (neniu mencio pri tiu, kiu verkis eventuale la plej notindan unuaktaĵon en Esperanto, la japano Tabata Kisaku) kaj malekvilibroj (argumenteble tro da atento pri la itala literatura rondo La Patrolo, kun kiu kaj Minnaja kaj Silfer intime asociiĝis), vere ne surprizu. Esperanta literaturo, post nur jarcento kaj kvarono, jam enormas, kaj certe ne eblas, eĉ en 748 paĝoj, ĉion kapti kaj egale pritrakti.

William Auld iam diris, ke la esperanta literaturo, kvankam nana kompare kun la angla, franca, germana, ktp, tamen ene de unu jaro liveras pli da libroj, ol li kapablas legi. Jen la pruvo en tiu ĉi alte rekomendata volumo: tiom da aŭtoroj, tiom da verkoj ... kaj tiom da plezuro. ■ PG

KUNVENIS en aŭtuno, kiel kutime, esperantistoj el suda Anglujo en la mezepoka abatejo *The Friars* en la vilaĝo Aylesford, apud Maidstone en Kent. Ili kunĝuis semajnfino da ludoj, muziko, prelegoj kaj tro da bongustaj manĝaĵoj.

Fakte la temo de la semajnfino estis ja “manĝaĵoj”. Kvankam tio ŝajnas eble neniel eksterordinara, estis surprize, kiom da aspektoj de la temo aperis dum la semajnfino.

Ni aŭdis ekzemple de **Sally Phillips** kaj de **Terry Page** pri la sanaj kaj malsanaj efikoj de diversaj aldoniĝaĵoj, kiuj troviĝas, ofte nerimarkataj, en nia manĝaĵo. Sally rakontis ankaŭ pri la diversaj manĝaĵoj, kiujn ŝi spertis en sia naskiĝ-lando Madagaskaro, kaj ankaŭ poste dum siaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Latin-Ameriko.

Anica Page priskribis tutan gamon de manĝeblaj plantoj troveblaj en la angla pejzaĝo kaj klarigis, kiel ŝi mem trovas kaj uzas ilin. **Peter Bolwell** prelegetis pri la politika signifo de manĝaĵo: kiel ekzemple grandaj korporacioj de la riĉaj landoj ekspluatas la rimedojn de afrikaj landoj kaj forpelas indiĝenajn loĝantarojn de iliaj tradiciaj bienoj kaj hejmoj.

Roy Simmons vort-pentris fascinajn kaj iom teruran bildon pri

la sorto de malriĉaj infanoj en Bolivio. Li montris, kiel li mem partoprenis en mirinda entrepreno por fabriki kaj, kiam ajn eble, vendi konfitaĵojn por helpi subteni la infanojn. Li kunportis kelkajn ekzemplojn, kiun ni volonte aĉetis.

Tamen ne la tutan semajnfino ni pasigis parolante pri manĝaĵoj. Laŭvice Terry Page, **Anna Montesinos** kaj Roy Simmons distris nin per cerbumigaj sed amuzaj ludoj pri vortoj kaj bildoj. Roy cetere gvidis nin dum duhora promenado tra la loka pejzaĝo. Multaj el la partoprenantoj muzike kontribuis, ekzemple per esperantaj tradukoj de kantoj el *Carmina Burana* kaj *Oliver*.

Multajn dankojn ni ŝuldas al la organizantoj Terry kaj Anica Page kaj Roy Simmons pro ĝuinda semajnfino. Tamen je la horizonto aperas nuboj: al la Internacia Amikeca Renkontiĝo en Aylesford aliĝis nur dek homoj.

Ĉu eblos daŭrigi la semajnfino sen pli da subteno - daŭrigi ne nur dum venontaj jaroj sed ankaŭ simple en 2016? La renkontiĝo estas la sola esperanta evento, kiu regule okazas ie en la sudo de Anglujo. [Regule okazas unutagaj tiel nomataj drondo-sesioj (diskuttrondoj) en Londono - Red.]

Tamen, se venos nur malmulte da homoj, apenaŭ indos ĝin denove prepari kaj organizi. Ĉu do ĝi perdiĝu pro manko de intereso? [Samon eblas diri pri multaj similaj eventoj, ekzemple federaciaj – Red.]

Se vi interesiĝas pri partoprenado en simila semajnfino

en septembro ĉi-jara, bonvolu informi kiel eble plej baldaŭ organizantojn, ekzemple Terry Page, Roy Simmons aŭ Sally Phillips, por diri, ke vi venos. Aŭ kontaktu min: piffkin@gmail.com

Ĝis revido en septembro en Aylesford! ■

Forestis universitatoj

NEPRAS danki al esperantistoj el nordokcidenta Anglujo kaj el norda Kimrujo, kaj el Merseyside mem, kiuj veturis al Liverpolo fine de oktobro por ĉeesti prelegon aŭspiciatan de la Buchanan-fonduso ĉe la tiea universitato.

Dankindas, ĉar, se ili ne estus venintaj, sidus nur unusola neesperantista membro de la Universitato de Liverpolo por aŭskulti prelegon pri iama profesoro pri la germana, kaj lekciisto pri Esperanto, nome William E. Collinson.

Collinson, kiel informis d-ro **Angela Tellier**, prelegante pri siaj esploroj pri la pionira interlingvisto, konatiĝis kun Esperanto jam kiel lerneĵano en Londono. La lingvon li flankenmetis por koncentriĝi ĉefe pri la germana, kiun li studis antaŭ la unua mondomilito en Germanujo, kaj ankaŭ por studi aliajn lingvojn.

Havante nur 25 jarojn, li fariĝis

profesoro pri germana filologio en Liverpolo, antaŭ ol militservi. Li reprenis sian intereson pri Esperanto pro hazarda renkontiĝo ĉe la universitato en 1918 kun J. D. Applebaum, aŭtoro, tradukanto kaj aktivulo en la Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio. Poste, danke al la Buchanan-testamento al la universitato en 1930, Collinson fariĝis lekciisto pri Esperanto.

Collinson emeritiĝis en 1954 kaj mortis en 1969. Lia libro, *La homa lingvo*, publikigita en 1927, restas, laŭ d-ro Tellier, ankoraŭ leginda, ofertanta solidan enkondukon en interlingvistikon.

La Buchanan-prelego, okazinta fine de oktobro, kaj jam la kvara tia aŭtuna evento ĉe la universitato, servis kiel reklamo por la tiel nomata “majstroklaso” en Liverpolo – tri tagoj da prelegoj pri kaj en Esperanto tuj antaŭ la semajnfina brita kongreso (16-a ĝis 18-a de marto; kongreso: 18-a ĝis 20-a). ■

IMAGU, ke vi planas ferii en fremda lando. Vi serĉas informon. Kion vi legas pri, ni diru, A-lando? Verŝajne, ke la vetero belas, homoj gastamas, kamparanoj plenas je humuro kaj saĝeco. Aliflanke ĉefurbanoj vivas pli rapide, en loko kun eventoplana historio. Tage eblas miri murojn gardantajn la kulturajn trezorojn de la lando; nokte en malnova kvartalo viglas kluboj kaj trinkejoj. Ĉiuloke troviĝas internaciaj restoracioj; la enlanda kampara kuirstilo tamen ege bongustas.

Vi volas kompari A-landon kun B-lando. Vi prenas aliajn informilojn sed ankaŭ tie temas pri bela vetero, saĝaj kamparanoj, internaciaj restoracioj kaj vigla noktovivo. Kaj ŝajne ankaŭ en C-lando, Ĉ-lando, D-lando. Eble eĉ en Z-lando regas la sama etoso. Vi konstatas, ke ĉiuj fremdujoj similas, do ne indas veturi ien ajn. Prefere ŝparu la monon kaj restu hejme.

Efektive vi eraras, duoble. La landoj ne estas tiaj, kiel en la broŝuroj, kaj ili malsimilas laŭ manieroj, kiujn oni ne aludas. Oni mensogas por allogi klientojn. Kaj jen la problemo de enlandano priskribanta la gepatran landon. Oni ĉiam emas mem flati sin: tion faras ankaŭ la angloj.

Aŭskultante anglajn priskribojn pri Anglujo, mi rimarkas, kiom tiuj ŝanĝiĝis ekde mia juneco. Tiam la ĉefpunktoj de angleco estis precipe tiuj de antaŭaj jarcentoj: lando kristana kaj protestanta (kontraŭ-katolika do), preta batali kontraŭ malamikoj en Eŭropo (do ankaŭ kontraŭeŭropa) kaj vartante grandan imperion, el kiu ĝi ĉerpis laborfortojn kaj krudmaterialojn por nutri industrion kaj komercon.

Kaj nun? Religio plejparte ne plu gravas, Britujo membriĝis en Eŭropa Unio, kaj la brita imperio estas malkonstruita. Mankas taŭga konciza priskribo por la nuna rolo de tiu lando. Pro tio eĉ pli malfacile eblas respondi al la demando, ne pri kiuj, sed kiaj, estas nunaj angloj.

Antaŭ nelonge mi aŭskultis radian diskutprogramon, en kiu leviĝis tiu ĉi demando. La gastoj devis difini "britecon". Neniu kapablis tion fari. Abundis banalaĵoj: toleremo, malfermeco, justeco, la nacia sanservo, vivado laŭ enlanda leĝaro ... kvazaŭ Britujo estus la sola tia lando. Efektive preskaŭ ĉiuj aliaj landoj en norda Eŭropo pretendus samajn flatajn ecojn. La malpli flatajn oni ne mencias.

Malofte britoj agnoskas, ke la prestiĝo de la pasinteco plejparte

malaperis. En 2013, kiam la brita ĉefministro vizitis Ĉinion, la ĉina ĵurnalo *The Global Times* komentis jene: “Britujo ne plu estas iaspeca ‘granda lando’, sed nur lando ... taŭga por turismo kaj studado eksterlanda kun kelkaj sufiĉe bonaj futbalteamoj.”

Ne endas centelcente kulpigi pro tio la anglojn. Insularo ne havas landlimojn, do ne havas tujajn najbarojn. Sen tiuj malfacilas kompari, kiamaniere unu lando malsamilas al alia. Kaj eĉ tiuj komparoj estas subjektivaj. Al francoj, angloj estas melankoliuloj; al svedoj, trinkejaj gajuloj. Kiu pravas? Ĉu oni prefere rezignu pri la tasko? Laŭ mi, ne. Eĉ subjektivaj opinioj malkaŝas ion pri la lando, kaj ju pli ilin oni interŝanĝas, des pli altas la eblo, ke aperos pli klara bildo. Mi do klopodis speguli la landon nek per bulĉapelitaj londonaj oficistoj nek per vomantaj grekinsulaj turistoj, sed kia ĝi ja estas.

LAŬMAPE, Anglujo proksimas al Eŭropo; laŭkulture, male. Eksterlandajn novaĵojn ĉerpas Anglujo ĉefe el Usono, Sudafriko, Hindujo aŭ Aŭstralio. Britoj emas raporti aŭ el la antaŭa imperio, aŭ el angleparolantaj landoj. Pri

Sudameriko, ekzemple, oni malmulton aŭdas. Tie situis nur unu brita kolonio ... kaj britoj ĝenerale regas nek la hispanan nek la portugalan.

Evidente, en Anglujo regas unulingvismo. Ne plu flegataj en lernejo estas fremdaj lingvoj. Kursoj malaperas ĉe universitatoj. Fremdlingvaj libroj estas elbibliotekigitaj kaj brokante vendataj. Proponu al anglo, ke tiu lernu fremdan lingvon, kaj tiu reagus, kvazaŭ vi proponus viziton

al dentisto ĉirkaŭ la jaro 1890.

Laŭ la ministerio pri

eksterlandaj aferoj nur tri el 16 britaj ambasadoroj en arabaj landoj flue parolas la araban. Ili do ne kapablas influi aŭ eĉ vere kompreni, kio okazas. Kaj oni plendas pri uzo de fremdaj lingvoj. Elstaran ekzemplon prezentas Nigel Farage, kiu plendis pri vagonaraj konversacioj en lingvoj aliaj ol la angla. Kiam Nick Clegg, kiu ja scipovas aliajn lingvojn, vizitis Berlinon kaj aŭdacis uzi la germanan, ĵurnalistoj plendis, poste koleris, kvazaŭ lingvo neangla ofendus. Krome oni plendas pri fremdlingvaj filmoj, ĉar neŝatataj estas subtekstoj.

Al kiuj landoj do la angloj rilatas, por ne resti izolataj? Al mi

Mallongigita versio de prelego ĉe la brita kongreso de Esperanto en Brajtono, aprilon 2015.

ŝajnas, ke staras inter landoj vandoj. Tiuj povas esti aŭ geografiaj aŭ kulturaj, kaj malsame dikaj. Tiuj inter Francujo kaj Belgujo, ekzemple, aŭ inter Svisujo kaj Italujo, relative maldikas. Tiuj inter Rusujo kaj Ĉinujo pli dikas. Sed vandoj inter Britujo kaj Usono preskaŭ travideblas, kvazaŭ la apudeŭropa brita insularo fakte apudus Usonon.

Temas parte pri la lingvo, sed ne nur. Ŝajne velkas la britangla, ĉar usonismoj pli mode sonas. Eblas telespekti dum tuta vespero kaj ne aŭdi britan voĉon krom en la novaĵoj, veterprognozoj kaj (parte) reklamoj. Krome la gazetaro minimume atentigas, kiam novaĵo fontas ne el Britujo sed el Usono.

Aperis lastatempe raporto en *i - eta versio de la ĵurnalo Independent*. Temis pri elektronikaj cigaredoj, la tiel nomata "vaporfumado". Nur fine de la dua alineo malkaŝiĝis, ke la esploron oni faris ne en la gepatra lando de la legantoj sed en Usono. Imagu, kia estus la rakonto, se temus pri esploro en Belgujo. Tiam oni prezentus ĝin kiel stranga afero ĉe strangaj fremduloj. Tuj la raportisto certigus, ke la vando inter ni kaj la belgoj restu netraversebla. Sed, se la esploro okazas en Usono, oni supozas, ke la rezultoj egale validas por Anglujo.

Kio pri la enlanda vivo de la angloj? La diraĵo "Mia hejmo estas

mia kastelo" estas bona indiko pri la vivmaniero de multaj angloj. Aĉeti, ne lui, estu la normo. Tamen lastatempe tiu sinteno malfortiĝas. Luantoj protestas, ke domposedantoj pritraktas ilin kiel malsukcesajn senmonulojn, kvazaŭ propra domo necesus por plena brita civitaneco. Ili demandas, kial kondiĉoj tiel malbonas kompare kun tiuj en Eŭropo.

En Londono la kostoj estas eĉ pli ridinde altaj ol aliloke. Tiu kondukas nin al la rolo de la ĉefurbo en la ĉiutaga vivo de la nacio. Kompareblaj landoj en norda Eŭropo jam delonge malcentralizis la registraron cele al pli efika administrado. Ne plu necesas grandega, prestiĝa ĉefurbo. Germanoj diras: "Ni ne plu vivas en la epoko de la poŝtokaleŝo." Francujo nun havas fortajn regionajn ĉefurbojn, krom Parizo, kiel Marsejlo kaj Liono. En Hispanujo malcentralizo ampleksas ne nur regionajn parlamentojn sed eĉ lingvojn, kiel la katalunan kaj la valencian.

Nenio tia en Anglujo. Jam dum la mezepoko, el la kvin tiam plej grandaj urboj de la lando - Londono, Jorko, Bristol, Koventrio kaj Norviĉo - Londono superregis. Nur la pligraviĝo de fabrikaj urboj en norda kaj meza Anglujo iom kontraŭpezigis la potencon de la ĉefurbo. Tiam oni diris en

Manĉestro: “Pensite hodiaŭ en Manĉestro, morgaŭ en Londono.” Sed post 1919 tiu industria kaj ekonomia potenco ekvelkis. Tiel, laŭ raporto aperigita en 2014, por arto kaj kulturo la registaro elspesis en 2012–2013, por ĉiu civitano ekster Londono, po £4,60, sed por ĉiu londonano po £69. Do Londono ricevas dekkvinoble pli ol cetera Anglujo. Ĉio ĉi en la tiel nomata Unuiĝinta Reĝlando.

ALIA AFERO tuŝas transporton. Por anglo nepras, kune kun propra domo, propran aŭton. Vivo sen ĝi apenaŭ imageblas. 85% de britoj havas aliron al aŭto. La situacio similas en najbaraj eŭropaj landoj. Tamen alilande oni uzas aŭton nur laŭbezzone. Aŭtokondukantoj uzas ankaŭ tramojn aŭ busojn, biciklas aŭ piediras. Angloj preferas ĝissate ŝofori. Laŭ esploro de 2008, el 8400 britoj, 24% promenis dum pli ol 20 minutoj malpli ol unufoje jare. Kvinono da angloj tute evitas piediradon.

Ankaŭ bicikladon oni neglektas. La Eŭropa Biciklado-Federacio enketis pri diversaj landoj. Ĝi listigis la plej biciklo-amikajn landojn en Eŭropo laŭ ĉiutaga uzado, vendado de bicikloj, sekureco, bicikla turismo kaj rekomena agado por biciklado. Unue staris Danlando, due Nederlando kaj trie Svedujo. La

Unuiĝinta Reĝlando aperis deke en la listo.

Britoj apenaŭ pli emas uzi la buson. 71% de aŭtokondukantoj inter la aĝoj de 25 kaj 61 neniam uzas buson. Tiaj homoj kutime pritraktas busuzantojn kun malestimo, kaj ne nur busuzantojn. En Novkastelo vivas tiuj, kiuj evitas bonan metroo-servon, ĉar ili ne volas vojaĝi kun fremduloj.

Nu, se vi ankoraŭ ne forĵetis viajn broŝurojn pri A-lando kaj B-lando, vi legos, ke, se vi ekkonas enlandan familion, vi ĝuos varman familian etoson, ĉar en tiu lando la familia vivo aparte gravas, ktp, ktp. Tiaj priskriboj de familioj tiom abundas tra la mondo, ke oni fariĝas suspektema. Ŝanĝoj en la vivmaniero, almenaŭ en pli riĉaj landoj, subfosas la rolon de la familio. Plendante pri tio al mia bofrato en Peruo, li certigis al mi, ke samo okazas ankaŭ tie.

Kio do pri la familia vivo? Gepatroj aŭ ignoras infanojn aŭ superŝutas ilin per mono aŭ donacoj, ne permesante al tiuj tempon kaj atenton, kiujn ili vere bezonas. Anglaj infanoj ne devas surŝultrigi respondecojn kiel en malriĉaj landoj, kaj gepatroj foje eĉ ne pretigas ilin por plenkreskeco. Alveninte en la lernejon, infanoj ne scias kiel uzi manĝilaron kaj rifuzas lerni tion fari. Ĉehejme mankas manĝaĵoj el freŝaj



Jack Warren, fotita en Shallowford dum la pasintjara somera festivalo.

ingrediencoj. Pli ofte oni kontentiĝas pri elporta manĝo antaŭ televidilo, komputilo aŭ poŝtelefono anstataŭ ĉirkaŭ tablo en familia rondo. Ĉiuflanke, ŝajne, individuismo atutas socian kunteniĝon.

ĈU ANGLOJ havas pozitivajn ecojn? Do, cele al ekvilibro, jen iuj, aŭ pozitivaj aŭ almenaŭ neŭtraj. Inter la neŭtraj estas: admiro por longviveco. Nuntempe necesas atingi naŭdek aŭ eĉ cent jarojn por ricevi tiun atenton. Sed oni admiras la homojn nur pro la aĝo, ne pro la atingoj de tiu longa vivo. Por la admirantoj, travivi estas ĉio.

Angloj aparte ŝatas sendi kaj ricevi salutkartojn kaj gratul-

kartojn diverstipajn. La elekto spegulas kromajn ecojn de la kulturo. Naskiĝtago meritas karton, kiel ankaŭ sukceso en aŭtokonduk-ekzameno. En Usono aĉetablas jam delonge kartojn por konatoj, kiuj enkarceriĝis: ni vidos, ĉu ankaŭ tiu usonaĵo akceptiĝos

en Anglujo. Angloj emas ankaŭ malavare donaci al bonfaraj fondaĵoj. Tiel, mi supozas, ni atingis pozitivajn ecojn.

Jen plia. Ili emas eviti vizaĝ-al-vizaĝajn konfliktojn, eĉ se, por ion atingi, necesas alimaniere kondukti, ol la konfliktantoj atendas. Ekzemplo estas la futballudo inter policianoj kaj strikantaj laboristoj dum la tiel nomata nacia striko en 1926. Simile butikistoj, kiuj, se ili ne povas vendi al kliento deziratan varon, estas pretaj rekomendi alian butikon, kie tiu artiklo aĉeteblas. Helpo atutanta konkuremon – ankaŭ pozitiva. Kaj vizitantoj el eksterlando konstatas, ke angloj ofte estas afablaj kaj helpemaj.

Aldone mi diru, ke plej afablaj estas ne la elegantulo, sed la ordinarulo, eĉ la ĉifonulo. Petveturante dum mia juneco, mi

rimarkis, ke plej ofte haltis kamionistoj aŭ homoj en kadukaj kamionetoj – ne tiuj en la brilantaj novaj aŭtoj el la mensogaj televido-reklamoj. Krome, ju pli malflataj la statistikoj pri angla urbo – rilate drogmisuzon, krimadon, fruaĝan gravediĝon, ekzemple – des pli afablaj la homoj. Mi ne volas diri, ke la enloĝantoj de Bath aŭ Harrogate estas malafablaj – nur, ke oni estos pli varme akceptata en Stoke-on-Trent, aŭ Hartlepool, do en lokoj, pri kiuj oni plejofte aŭdas negativajn novaĵojn.

RESTAS unu eco, kiun preskaŭ ĉiuj angloj pritraktas kiel nepre pozitiva. “Vi devas agnoski,” ili diras, “ke nia humuro-sento superas tiun de ĉiu alia lando.” Certe la sinteno de la publiko indikas, ke humuro, paradokse, gravas. Fremduloj renkontiĝantaj por la unua fojo ofte ekkonversacias kun ŝerco. Publika parolanto devas kapti la atenton de sia aŭskult-antaro per ŝerco, antaŭ ol plui al sia pli grava mesaĝo. Novaj komikuloj abundas televide, kaj oni ade ripetas la sukcesojn el antaŭ pli ol 30 jaroj de malnovaj, intertempe mortintaj, komikuloj. Kial ne? Pli bone ridi ol plori.

Angloj pritraktas nacian humuron kiel ion netuŝeblan. Pri vetero aŭ registaro oni rajtas plendi, sed ne pri la granda brita

humuro. Kial ĝi meritas tiun netuŝeblecon? Ĉar humuro servas por eviti temojn malkomfortajn, kiujn oni prefere ne esploru. Angloj ŝatas ŝerci pri si mem, sed ne amuziĝas, kiam alilandanoj same faras.

Kaj kiujn rajtojn oni havas, se oni ne volas ŝerci? Se vi iam intervjuiĝis pri Esperanto, vi certe laciĝis pro la bezono daŭre prezenti ĝin kiel amuzan, eĉ distran, aferon. Por angloj la defio estas ne humuro-sento, sed graveco-sento. La angla sociologo Kate Fox en sia libro *Observante la anglojn* komentis, ke angla funebraĵo estas neeltenebla evento, ĝuste ĉar tie ne eblas fari ŝercojn. Eble pro tiu aparta bezono daŭre ŝerci, komikuloj nun pli ofte partoprenas televidajn diskut-rondojn pri gravaj temoj kiel politiko, ekonomio kaj edukado. Gravaĵojn oni prefere aŭdu el la buŝoj de negravuloj.

Alia flanko de tiu ridemo estas la kontraŭ-intelektismo de la angloj. Miaj samlandanoj certe ne estas pigruloj – multaj ne havas la okazon pigrumi – sed ili facile kontentiĝas per tro simplaj respondoj al malfacilaj demandoj. Parolante pri eventualaj ŝanĝoj al la brita konstitucio, la verkisto kaj eksa politikisto Roy Hattersley komentis: “Kompare kun eŭropaj socialistoj, ni emas eviti ideologion.” Ĝuste; kaj ju pli abstrakta, des pli evitinda.

Estante anglo, mi intencas aludi nur anglojn, ne britojn. Mi ne sukcesis distingi anglojn disde britoj. Vole-nevole mi uzis ambaŭ interŝanĝe; kaj ne senkiale. Pasintece la angloj malbone traktis kaj ekspluatit siajn najbarojn. El tiu malbona rilato restas malamo kaj antaŭjuĝoj ambaŭflankaj. Tamen miaj gepatroj – ambaŭ centelcente anglaj – estas tiurilate relative klerigitaj. De ili mi lernis respekti neanglajn britojn.

Tamen, se kimroj, skotoj kaj irlandanoj malsimilas al angloj, necesas distingi inter du klasoj da malsimileco. Skotoj kaj angloj malsimilas sammaniere kiel bavaroj kaj prusoj en Germanujo, aŭ lombardoj kaj napolanoj en Italujo, aŭ gaskonoj kaj normandoj en Francujo. Temas efektive pri internaj kaj eksteraj diferencoj. Franca vizitanto ne rimarkas diferencon inter skoto kaj anglo, ĝuste kiel mi en Francujo ne rimarkas, kiu estas la normando kaj kiu la gaskono. Rigardante la landon el ekstere, oni vidas pli da similaĵoj ol diferencoj. Se skoto diras “Skotoj tute malsimilas al angloj”, tio ne signifas, ke angloj estas por tiu tiel fremdaj kiel rusoj aŭ fiĝianoj.

Do jen mia konstato, kiun mi anoncas je ioma persona risko: skotoj, kimroj kaj nordirlandanoj ja malsimilas al angloj, sed ne tiom,

kiom ili supozas. Se vi ne kredas min, pensu iomete. Kiom da neanglaj britoj vi konas, kiuj respektas la francan kulturon? Lernis flue paroli fremdan lingvon? Ŝatas spekti filmojn kun subtekstoj? Preferas lui domon anstataŭ aĉeti ĝin? Rezignas pri aŭto? Ĝin stiras je la dekstra stratoflanko? Ne sendas salut- aŭ gratul-kartojn? Ne ridas, tele-spektante komikulon? Preferas kafon al teo? Trinkas tiun teon sen lakto? Ne; el la vidpunkto de eksterulo – ekzemple la ofte aludata inteligenta marsano – anglaj ecoj estas plejparte ankaŭ britaj ecoj.

DO KION fari? Kion angloj povus fari por sin plibonigi? Plibonigado postulas ion novan, nome konsilon el aliloke. Sed la tradicio, tiu de la imperio, malpermesas, ke britoj lernu de aliuloj: male, britoj instruu al aliuloj, kion fari, kaj sekvu la bonan britan ekzemplon. Tamen Anglujo povus lerni, ekzemple de Nederlando, kie similas la klimato, kie dense loĝata lando dependas de importvaroj, komerco kaj industrio, kaj havis transmaran imperion. Dum miaj tieaj vizitoj mi havas la impreson, ke nederlandanoj pli bone adaptiĝis al nunaj cirkonstancoj ol la angloj.

La medio estas tiel protektata, ke oni povas kontentige vivi. Aŭtojn

oni uzas laŭbezone, sed biciklado eniris en la vivmanieron de la lando, kaj por ĉiuj. La registaro estas malcentralizita kaj demokrata. La lando kutimiĝis al enmigrado: oni diris al mi, ke novaj enmigrintoj lernantaj la nederlandan lingvon ankaŭ, se necesas, lernas kiel bicikli. Nederlandanoj estas bone edukitaj kaj ofte regas plurajn lingvojn. Ne estas, kiel en Anglujo, malkomforta distanco inter sociaj klasoj. Se ankaŭ la angloj havus tiujn ecojn, la lando pliboniĝus.

Tiel, humile, mi prezentas al angloj dekpunktan programon por plibonigi kaj la landon kaj sin mem:

1. Invitu aliulojn partopreni debaton, kiaj vere estas Anglujo kaj Britujo. Provoku laŭbezone. Ne restu ĉe komfortaj, sintrompaj supozoj.

2. Demandu al politikistoj, kial nia registara sistemo ne pli bone reprezentas la popolon. Aliĝu al movado, kiu celas tiurilatajn ŝanĝojn.

3. Se vi loĝas ekster Londono, legu regionan gazeton. Ne fidu ĉiun novaĵon, kiu fontas el la ĉefurbo.

4. Se vi havas aŭton, metu la ŝlosilojn en malfacile atingeblan lokon. Se via celo estas ne pli ol 1,5 km for, iru piede; se ne pli ol 6 km, biciklu; se ne pli ol 10 km, busu. Tiel vi ekkonos la ĉirkaŭaĵon de via loĝejo.

5. Plendu pri la misuzo de la angla lingvo ĝenerale, kaj de la britangla aparte. Ne toleru senkome la uzon de usonismo, se taŭga britismo servas.

6. Legu literaturaĵon tradukitan el alia lingvo, kaj/aŭ spektu filmon en alia lingvo kun subtitoloj.

7. Pretigu manĝon kun freŝaj ingrediencoj kaj dividu ĝin kun minimume unu alia persono.

8. Konversaciu kun homoj, kiuj ne apartenas al via aĝgrupo. Necesas paroli kaj aŭskulti.

9. Adaptu salut- aŭ gratul-kartojn al novaj okazoj aŭ ĝojfontoj taŭgaj por nova kaj pli ĝoja Anglujo. Ekzemple: “Mi gratulas vin pro via nova biciklo ... pro piedirado al la laborejo dum ses monatoj ... pro tiu signifoplena naskiĝtago – kaj via buspermesilo.”

10. Eklernu fremdan lingvon. Elektu lingvon belsonan, facile lerneblan, kun logika gramatiko kaj literumado, kaj kies parolantoj troviĝas dise tra la tuta terĝlobo. Vi ja scias, pri kiu lingvo temas. ■



La historio de la tiulingva literaturo estas recenzita en paĝo 25.

ATINGIS nin en oktobro la bela sed surpriza novaĵo, ke en novembro en Londono starigos *Japan Society* publikan prelegon pri Esperanto, sub titolo “Rebildigante la pozicion de Japanujo sur la monda scenejo en la frua 20-a jarcento”. Ĉar mi profunde interesiĝas pri la unuaj 50 jaroj de la Esperanto-movado, sed aŭdinte kaj sciante nenion pri Japanujo, mi taksis la eventon partopreninda. Ke ĝi estis senpaga, faciligis la decidon vojaĝi al Londono. Mi ĝin ne bedaŭras.

La prelegon prezentis d-ro **Ian Rapley** de la Universitato de Kardifo, fakulo pri moderna orientazia historio. Li lernis la bazojn de Esperanto kaj komunikis kun esperantistoj en Japanujo. Tamen rapide sin montris al li la realo, ke lia jama altnivela japana lingvo pli facilis por komuniki kun ili. Sed li metis sin almenaŭ en pozicion uzi kaj koni Esperanton.

Tiu lasta punkto utilis, ĉar li

mem tute taŭge prelegis pri Esperanto al la ĉeestantaro. Plurfoje li klare substrekis, ke la rolo de Esperanto ne estas anstataŭi aliulajn lingvojn, sed fariĝi ilo por homoj, kiuj ne jam dividas komunan lingvon. Bonega komenco!

Li rapide kondukis nin tra prezentado de la pioniroj de la Esperanto-movado japana. Ni aŭdis, ekzemple, pri diplomato, kiu ne vere kapablis partopreni en ĉirkaŭtablaj diskutoj. Kvankam tiu lernadis la anglan aŭ la francan, la lingva distanco tiel vastis, ke malgraŭ plej diligenta strebado li simple ne povis konkurenci kun denaskuloj. La diplomato fariĝis do fervora subtenanto de Esperanto. Jen al mi novaĵo.

D-ro Rapley montris per fotoj kaj anekdotoj, ke la plej pinta periodo estis la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj, koincide ankaŭ “ora epoko”, laŭ kelkaj historiistoj de Esperanto en Eŭropo. Uzadis Esperanton en Japanujo anarkiistoj kaj socialistoj, lernejoj, sciencistoj, inĝenieroj kaj doktoroj. Vizitis Japanujon fremduloj, kiuj parolis la lingvon kaj, male, japanoj eksterlandiĝis per ĝi.

Post la prezentado Terry Page kaj mi dividis la opinion, ke la evento certe ĉeestindis. Eĉ Terry,



MI UNUE vidis Brian O'Sullivan, kiam li prezidis kongresan komitaton en Sheffield, ĉe Ranmoor House, eble en 1967.

Dum jaroj li prezidis la jorkŝiran federacion kaj dum kelkaj jaroj li redaktis nian bultenon, *La Blanka Rozo*. Antaŭe la bulteno estis multobligita per ŝablono. Brian tute alie faris ĝin, sur unu granda folio, kiel ĵurnalpaĝo kaj kun koloro.

Brian deĵoris dum britaj kongresoj en Sheffield kaj ankaŭ en Scarborough en 2006. Laŭ mi lia plej grava laboro estis kiel ano de la organiza komitato de studentoj ĉe la Universitato de Sheffield, kiuj prezentis lingvan festivalon en 2011. Jam maljuna, Brian ne nur ĉeestis komitatkunsidon sed ankaŭ, kune kun Gillian Cartledge, deĵoris ankaŭ tutan semajnfino. Tiel



Brian O'Sullivan, fotita dum la lingva festivalo en Sheffield en 2011, kiun li kunorganizis.

Esperanto enkondukiĝis ĉe la festivalo, kaj ankoraŭ restas.

Brian restos en mia memoro kiel bonkora kaj amikema samideano. Multaj sentos lian mankon. ■

multe pli sperta ol mi, multon lernis. Jen bela surprizo ... kiel ankaŭ, almenaŭ al mi, la informoj, ke Esperanto en Japanujo daŭre floras.

Mia lastatempa esplorado

montras, ke la japanan Esperanto-kongreson en 2012 partoprenis 356 homoj, 719 en 2013, kaj 407 en 2015. Ĉu ni iam atingis tiajn ciferojn dum la tuta historio de Esperanto en Britujo? ■

Esperanto en neesperanta mondo

Ĉiam plaĉas, kiam legeblas esperanta vorto en neesperanta mondo. Amuza – kaj argumentebla trafa – estas la nomo de la nederlanda *Rabobank*, elektita supoze sen scioj pri la internacia lingvo.

Aliajn ekzemplojn trovis **Hilary Chapman**. *Vestoj* estas la titolo de fakrevuo celanta transponti modon kaj scian esploron. La nomon oni elektis, ĉar la vorto “devenas de konstruita lingvo ... sen kulturo” kaj “iom utopia kaj avangarda”. Sen kulturo ... espereble kontribuantoj al *Vestoj* pli spertas pri modo ol pri Esperanto. lbsp.org/vestoj

Kaj germana firmao vendas “electric verhicles” (tiel) de la marko *Trankvile* – esperanta nomo intence elektita. lbsp.org/trankvile

Ankaŭ sukero-markon trovis Hilary: *Pure via*.

Ĉu vi sciis ...

... ke en 1949 du fratoj, Colin kaj Stan Smith, transiris Atlantikon en vel-boateto, hejmkonstruita (sed ili devenis de familio de boat-konstruistoj) kaj nur 20 futojn longa, kiu nomiĝis *Nova Espero*? Pliaj informoj pri la 43-taga, 2 700-mejla transiro troveblas en interreto. lbsp.org/nova-espero

Paul Gubbins



En Liverpolo ...

... vizitu la anglikanan katedralon kaj, apud la ĉefenirejo, vi vidos la tiel nomatan Promenejon Popolan (angle: *The People's Path*). Ĝi konsistas el brikoj dediĉitaj al individuoj kaj al organizaĵoj – inkluzive de Esperanto. La koston de la briko pagis membroj de Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio, kaj ĝin fotis **Peeter Aitai**.

Dum en Ganao ...

... eble malaperos la angla kiel ĉefa lingvo de lerneja instruado. La ministrino pri edukado, prof. Jane Naana Opoku Agyemang, diris, ke

“kiam ni povos forigi la anglan [kiel lingvon de instruado], ni ŝanĝos ĉi tiun landon”. Malhelpas infanojn la fakto, ke ili estas instruataj per fremda medio, aldonis la ministrino. Dankon al **István Ertl** pro la ligo! lbesp.org/agyemang

Komercaj aferoj

Ne malmultas firmaoj, kiuj konscie aŭ nekonscie adoptis komercocele esperantan nomon. Dum la kristnaska periodo mi rimarkis kamionon, kiu apartenas al la sanvaro-liveranto *Alloga* (ne eblis foti, ĉar mi ŝoforis).

Hilary Chapman atentigis pri tri tiaj kompanioj, kies nomoj aŭ produktaĵoj ŝuldas sian ekziston al doktoro Zamenhof: *Afero* (laŭ la retejo la vorto devenas de “fiaskinta” provo pri universala lingvo), *Kurento* (speco de komputila servilo), kaj *Norda Stelo* (kanada inĝeniera firmao). Aliaj ekzemploj bonvenas!

Plenaĝa Esperanto

Nia lingvo jam plenaĝiĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam ekaperis en la interreto almozpetantaj leteroj, ĝenerale en mizera Esperanto (rezulto de maŝintradukado, verŝajne), invitante donaci al malsanuloj, malriĉuloj, viktimoj de inundoj, cunamoj, ŝtormoj, militoj, en la tiel nomata tria mondo.

Legeblis en oktobro en la

interreto plia indiko pri la maturiĝo de Esperanto. La ĉiam observema **Hilary Chapman** rimarkis raporton pri minaco farita, en Esperanto, dum teksteca reta ludo en Usono. Aperis la mesaĝo (mi retenas la originalan literumadon kaj erarojn): “Se vi logxas en la Ohio State universitato, mi avertas vin. Morgaux je la 15 an horon de la 27a de Oktobro 2015, mi mortigos studentojn kaj instruistojn per pafiloj. Mi havas pafilojn kaj eksplodajxojn en mia cxambro, kiu mi uzos.”

Ĉu ŝerco aŭ ne, la universitato kaj la polico traktis serioze la mesaĝon. Jen eble la unua terorisma minaco farita en la internacia lingvo Esperanto.

lbesp.org/minaco

Kiam vortoj bel(l)os ...

Lenio Marobin atentigas pri mencio pri Esperanto en libro eldonita en 2011: *Is That a Fish in Your Ear? The Amazing Adventure of Translation*. La aŭtoro, David Bellos, mallonge parolas pri Esperanto, sed nomas ĝin “kulturlingvo” de kelkaj centmiloj da homoj. Aldonas Bellos, ke Esperanto ne uzatas en rondoj sciencaj aŭ komercaj sed servas ĉefe por traduki por esperantistoj poezion, dramon kaj fikcion. Pri originala literaturo, malpli bele, silentas Bellos. ■



Privata fervojo en nord-okcidenta Anglujo nomis novan lokomotivon Esperanto.

Okazis nomo-ceremonio kun reprezentantoj de EAB. Eblas viziti la fervojon laŭ interkonsento kun la fervoja sekretario, kies adreso kaj aliaj detaloj haveblas de Esperanto-domo, Barlastono.